

Nia feria migrado en Alpoj, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 625, 1975.10.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por plilongigi la someran periodon ni invitas vin ferii kun ni, daŭrigante raporton pri migrado okazinta en Berna Oberlando dank'al la organiza iniciato de Svisa Esperanto-Junularo. Dum tiu ekskursado en Alpoj ni estis grupo de 11 geesperantistoj el Svislando, Francio kaj Hungario.

A.- La migrado komenciĝis en *Meiringen*. Konkludiĝis la dua tago per tranoktado en montara hoteleto nomata *Waldspitz* (pinto de la arbaro) super *Grindelwald*.

Cl.- La merkredon 6-an de aŭgusto ni komencis per matenmanĝo sur la teraso de tiu restoracio, vidalvide de la famaj oberlandaj montoj *Eiger* (ogro), *Mönch* (monako) kaj *Jungfrau* (virgulino). La vetero daŭre belegis. Ni lasis niajn dorsosakojn en nia trannoktejo, kaj la tutan matenon ni alsupris ĝis *Faulhorn* (la putranta pinto) je dumil sescent okdek metroj de alteco. Tiu supro estas tre frekventata, ĉar seĝlifto forveturanta el *Grindelwald* kaj alvenanta en *First* permesas gajni senpene mil metrojn de alteco. Sed tucerte *Faulhorn* estas tre bela vidpunkto. Sude ĝi rigardas al la bernaj alpoj, kiuj ofte atingas pli ol 4'000 metrojn de alteco. Norde estas videblaj la lagoj de *Brienz* kaj *Thun*, la unuaj alpaj montararoj, kaj se la vetero tre belas, je la horizonto la montararoj Ĵuraso kaj eĉ Vogezoj en Francio kaj Nigra Arbaro en Germanio. Vintre dum fentago mi havis la okazon admiri tiun mirindan panoramon. Tiam la koloroj estis neordinaraj. Tute proksime la lagoj Brienz kaj Thun estis verdbluaj, granda nebulmaro kovris la svisan mezlandon kaj etendiĝis inter la montararoj Ĵuraso, Vogezoj kaj Nigra Arbaro, kies suproj malhelbluis. Tre verŝajne ilin ne kovris jam neĝo. En somero la panoramo ne estas tiom vasta, pro la netravedebleco de la aero. Sed tamen ni restadis longe je la supro de la monto, rigardante la herbejojn, kie paŝtiĝis brutaroj kaj piknikante en la hotelo, stranga konstruaĵo simila al tiuj, kiujn oni vidas en Sudfrancio.

A.- La alvalado ĝis *Grindelwald* estas sufiĉe longa kaj tre dekliva. Ni trairis belajn alpejojn kun akvofaloj, sidadis apud lagoj, la pado serpentumis en arbaroj kovritaj de mirteloj kaj erikoj. Kiam ni alvenis en la naturamika gastejo de *Grindelwald* je la sesa horo vespere ni devis tuj manĝi. En tiu gastejo la disciplino estas iom soldateca, sed la komforto estas agrablega. Duŝoj estis bonvenaj post ŝvitado tritaga.

Cl.- La vespero dediĉita al lingvaj diskutoj kaj la tranoktado preskaŭ tro rapidis. Jam estis la ĵaŭdo 7-a de aŭgusto. Tre bela kaj klara vetero. Dent-rela fervojeto transportis preskaŭ je la supro de la pasejo *Kleine Scheidegg* la marŝantaron, kiu havis antaŭ si sufiĉe longan programon.

A.- La pasejo *Kleine Scheidegg* (esperanta traduko : malgranda dispartigo de la akvoj), tucerte estas unu el la plej impresigaj pejzaĝoj de Svislando. Pro tio ĝi altiras ĉiutage milojn da turistoj, kaj multaj el ili ne haltas nur en la pasejo. Per la dent-rada fervojeto ili ascendas ĝis la stacio *Jungfraujoch*, kiu situas je 3450 metroj super la marnivelo. Dum ni piknike tagmanĝis sur la paseja herbejo, ni vidis dekojn da trajnoj direktiĝi al *Jungfraujoch*, multaj estis plenaj da japanoj.

Cl.- La vando de la monto *Eiger*, kiu altiras la alpinistojn, reprezentas vertikalan ŝtonaron de preskaŭ 2 kilometroj de alteco. Kiam oni rigardas al la monto *Jungfrau*, oni rimarkas du

neĝajn piramidojn, kiuj estas kiel la mamoj de la virgulino, iliaj veraj nomoj estas Schneehorn (neĝpinto) kaj *Silberhorn* (arĝenta pinto). Dum preskaŭ du horoj niaj rigardoj migris sur tiuj gigantoj, kaj ni aludis al la legendo, kiu volas, ke la ogro (Eiger) provas ataki la virgulinon (Jungfrau), kies protektanto estas la monako (Mönsch).

A.- La pieda alvalado al *Lauterbrunnen* kaj *Wengen* estas bela promenado, kiu perdigas al ni pli ol 1250 metrojn de alteco. En la vilaĝo Wengen nia grupo perdis aninon. Por nin adiaŭi, ŝi invitis la marŝantaron por trinki tili-infuzaĵon el artiste dekoraciitaj bovloj. Fakte ni troviĝis ĉe veraj artistoj, kiuj brodas tapetojn kaj tapiŝojn. Ni povis admiri du el iliaj ĉefverkoj vizitante ilian plaĉan ĉaledon.

Cl.- La valo *Lauterbrunnen*, en kiun ni profundigis, estas tipa glaĉera boritaĵo. Ĝi larĝas centon da metroj, kaj ambaŭ flankoj estas rokandoj 800 metrojn altaj. La riveroj formas aŭ akvofalojn aŭ profundajn gorĝojn. Oni devas viziti tiun ĉi valon de *Lauterbrunnen* por konatiĝi kun la rezulto de la laboro de la malaperintaj glaĉeroj.

A.- Funde de tiu ĉi valo, kiun parton de la grupo laŭiris piede, dum la aliaj preferis aŭtobusi, troviĝis komforta naturamika gastejo, kie ni fine trovis verajn litojn. Vespere la virkoruso de tiu vilaĝo *Stechelberg*, la *Jodelklub* (jodlo-klubo), venis prezenti al ni tutan programon, kantante folklorajn kantojn en regiona kostumo kamparana.

Cl.- Sciante, ke la morgaŭon nin atendas longega kaj sufiĉe streĉa marŝado, tuj post tiu plaĉa spektaklo ĉiuj rapidis al la lito.

A.- La venontan semajnon ni dediĉos lastan prelegon al tiu ĉi migrada raporto, esperante, ke niaj priskriboj konvinkos vin partopreni ekskursadon en la svisa montaro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!